

*Havano, lando kantita de
Martí kaj Hemíngway,
rekantis en Esperanto.*



Redaktore

Same kiel ni komencis lastnumere, ni enretigos artikolojn unu post la alia, sen promesa aperdato, ĝis la monato de julio, kiam la eldono oficiale fermiĝos. Bedaŭrinde, julio venis, kaj ankaŭ oktobro, kaj nun jen februaro kiam la julian numeron ni fermas. Multaj aferoj kaptis la intereson kaj laborkapablon de ĉi tiu redaktoro, sed fidele al mia kompromiso kun vi, leganto, ne pro tio la numeroj de oktobro kaj januaro malsukcesos trovi vin baldaŭ. Pro tio restos ĉi-tiu numero julie, eĉ se publikigite sekvantjare.

La gravaj eventoj nunaj en Hispanio denove ne permesas al ni preterrigardi politikon, ĉefe pro tio, ke emerituloj vidas sian monon neplialtigebla por la unua fojo en la historio de la mondo, ne diri de Hispanio. Tio tuŝas min rekte, ĉar antaŭ nur kvar monatoj mi jam oficiale emeritiĝis, fakte kelkajn semajnojn post la UK de Havano; sed eĉ se tio ne okazintus, mi ankaŭ solidariĝus al tiuj homoj, kiuj doninte la plej bonon el si mem al socio, ne meritas, esti mizeraj pri ties enspezoj. Same funkciuloj, la homoj, kiuj marŝigas la ŝtaton, vidas siajn salajrojn malpliigitaj. Kaj tio, laŭ mi,

estas risko, kiu ŝtato vere ne povas permesi al si. Ĉar funkciuloj estas la solaj laboristoj, kiuj povas haltigi ŝtaton..., se homoj ne estus, ĝenerale, tiom malkuraĝaj en Hispanio, kiel ni jam denoncis fojfoje ĉi tie: oni forprenas, iom post iom, demokration de nia komuna havaĵo, kaj neniu elstaras defendi ĝin. Tio estas certigo, ke hispanoj neniam meritis demokration aŭ liberecon, ĉar oni havas nur tion, kion oni gajnas kaj konservas batalante kontraŭ tiuj rabistoj, kiuj deziras sklavigi nin per forpreno de nia plej inda havaĵo.

Sed la nuna krio mona kaj ekonomia havas apartan version en Mursjo, kie la regiona registaro decidis laste malpligrandigi la salajron de kaj geinstruistoj kaj gedoktoroj kaj geflegistoj po 76 eŭroj, kio ekstartigis akrajn manifestaciojn en la ĉefurbo, motorigitaj de oficialaj sindikatoj CCOO (laborismaj komisionoj) kaj UGT (unuiĝo ĝenerala de laboristoj), ambaŭ ricevante entute pli ol 9 000 milionoj da eŭroj el hispana centra registaro de Rodriguez Zapatero, kiu neis la krizon dum tri jaroj, tiel pligrandigante ĝin, kaj pro tiu stipendio nenion reklamante al li.

Tamen, ni ne estu tiom malpozitivaj, ĉar iel ajn ni progresos kaj laboros iom post iom, fosante nian sulkon modeste, sed kuraĝe.

Esperante, ke vi, leganto, taksu nian agadon sufiĉe grava por dediĉi al ĝi kelkajn minutojn de via libertempo, salutas via redaktoro

Jesuo.

Parolas la Prezidanto

Estimataj gehaleanoj:

Hispanio strikas. Jes kun socialisma estraro, la laboristoj faras strikon. Ĉu tio estas normala?

Mi opinias, ke ne, ĉar la estraro ne faras socialan politikon.

La popolaj partioj atakas kaj atakas estraron de Hispanio, sed la solvo de la Popola Partio ne estas bona. Ĉu oni kredas ke ili plialtiĝos la salajrojn? Mi pensas ke la solvo, kiun ili volas estas plialtigi la laboradon, malplialtigi la salajrojn nome de la merkato.

Ha, la merkato! vorto sankta, vorto plena de sankteco! Sed la merkato, la estraro de la merkato faras krizon, kiun ili volas, ke la laboristoj pagu.

Ha, la merkato!, vorto plena de sankteco! Sed la solvo de la krizo, laŭ la merkato, estas rabato de la salajroj, dum estroj de la merkato emeritiĝas kun grandaj salajroj.

Kiu pagas la altajn salajrojn de la estraro de la merkato?

La mizeraj salajroj de la laboristoj..., sed kion fari?



Nek pensibato nek aŭsterplano! Ĝenerala sĝtriko!

Tial oni ne aĉetu loĝadon en Hispanio nun.

Ĝis ne tiom longe okazis en Hispanio stranga frenezaĵo: ĉiuj deziris havi propran loĝejon, kvazaŭ ĝin ne havi estus statuso de oficiala malriĉulo, kio vere estu evitenda. Mi memoras sensukcesajn diskutojn kun geamikoj kaj eĉ gefamilianoj pri la afero, ke lui estas pli konvene, almenaŭ dum oni ne scias kie oni enradikiĝos, kaj ke tio, esence, havas malpli da maldezirindaj sekvoj ol avantaĝoj, sed finfine mi ĉesis miajn rezonadojn, ĉar ŝajnis al mi, ke mi diskutas kun muro: oni nepre aĉetu, kaj se iam oni devos vendi, oni ricevos multe pli da mono, ol oni pagis aĉetante la loĝejon!

Bedaŭrinde, tio estis komuna penso en Hispanio dum la plej longa parto de mia vivo, ĝis la nuna momento, kiam tiu pensomaniero iĝis katastrofon por multaj familioj kaj individuaj homoj. Kaj tio okazis, larĝe, pro tio, ke la kutimo legi la malgrandajn literojn en kontraktoj ankaŭ ne estas larĝe uzata kutimo ĉi tie:

Ni imagu kio okazas en lando, kiu suferas sovaĝan kapitalismon, kie, aldone, estis rego ĝis antaŭ unu jaro de ekstremdekstra prezidanto, Usono: se oni ne

povas pagi la hipotecon, ĉar la kosto de vivo plialtiĝis tiom multe, ke per sia salajro oni ne plu povas kaj vivi kaj pagi la ŝuldon, oni simple iras vidi la bankiston, kaj donas al li aŭ ŝi la ŝlosilon de sia hejmo, kaj tiel finas la afero. Oni ne plu havas hejmon, sed ankoraŭ oni povas revii pri pli favora tempo, kiam siaj monaj kondiĉoj povos permesi al si aĉeti hejmon. Dume, oni luan kaj ploran.

Nun ni imagu kio okazas en lando pli moderna, kie regas de antaŭ sep jaroj socialisma prezidento, kiu pretas fari ĉion, krom mallarĝigi la rajtojn sociajn de l' popolo, Hispanio: se vi akceptis la komunan ideon, ke vi estas neniu, se vi ne posedas vian propran hejmon, kaj vi ankoraŭ ne pagis ĝin, la estonto ne estas tre ridetema al vi. Plej granda kvanto da hispanoj estas mileŭristmaj, tio estas, ili gajnas nur ĉirkaŭ mil eŭrojn monate. Aĉetonte vian apartamenton, vi decidis, ke el via salajro vi povos pagi 600 eŭroj, ĉar vi ankoraŭ vivas kun viaj gepatroj. Vi ankoraŭ ne edziĝis aŭ edziniĝis, sed vi jam havu almenaŭ vian amoneston. Vi komencas pagi, kaj eĉ sukcesas, kun helpo de gepatroj, sendependiĝi kaj vivi en

via propra hejmo, almenaŭ kelkajn tagojn monate. Sed subite maljunuloj, kiuj laboras en la Eŭropa Centra Banko, decidas plialtigi la valoron de eŭribor'! Vera katastrofo venas al vi, ĉar vi ne plu pagas po 600 eŭrojn monate, sed 650, eĉ 700. Sed venas pli granda katastrofo, tio, kion oni nomas krizon, kion via social-zorgema prezidento diris, ke ne venus, kaj vi ne nur devas pagi 700, sed 1 100 eŭrojn al banko.

Kia vi iĝos, bebo, kia iĝos vi?, kiel kantisto Serrat sin demandis antaŭ kelkaj jaroj (¡Nena, que va a ser de ti?) Nu, per helpo de viaj emeritaj gepatroj, vi sukcesas pagi la hipotecon kelke da tempo, ĝis kiam pro tiu diabla krizo, via entrepreno maldikiĝas sian sklavaron, kaj vi perdas vian postenon. Vi serĉas novan postenon pri via fako, kaj poste pri ia alia fako, sed vi sukcesas trovi nenion, spite al via juneco kaj kapableco. Viaj gepatroj ne plu povas pagi vian hipotecon, ĉar siaj ŝparoj jam finiĝas, kaj ili (kaj vi) devas manĝi ĉiun tagon. Finfine vi, ĉagrene, devas diri al banko, ke vi ne plu povas pagi al

ili, almenaŭ ĝis kiam vi trovos postenon. Eĉ se bankistoj estus bonkoraj kaj dirus al vi, ke ili atendos, finfine eĉ tiu bonkora pacienco elĉerpiĝos, kaj banko forprenos vian koran hejmon, kaj revendos plej alte kiel eble. Post kelkaj monatoj, ili diros al vi, ke ili



pruntedonis al vi 240 000 eŭrojn, sed ili sukcesis vendi ĝin por nur 80 000. Tio signifas, ke vi ankoraŭ ŝuldas al via banko 160 000 eŭrojn!, kaj vi nepre devos redoni al banko, kiam vi havos monon.

Nun ni revu denove, kaj supozu, ke vi sukcesos trovi postenon, kaj vi denove povos gajni almenaŭ mil eŭrojn. Banko igos juĝiston interveni vian salajron, tiel, ke vi devos pagi almenaŭ 40% de via mono al banko ĝis kiam la ŝuldon vi jam pagis. Supozante, ke vi jam pagis al banko antaŭ la krizo 40 000 eŭrojn, vi devos pagi

Finas en paĝo 9^a

UK en Havano


La pasintan 17-an de julio komencis en Havano la 95-a Universala Kongreso de Esperanto.

Ĵus reveninte de la grava evento jara de Esperanto, mi ne povas ne pensi pri la aferoj, kiuj plej ŝokis min dum la kongreso. Mi konis kongresanojn, kiuj ne certis ĉu ili manĝos ĉiun tagon, laŭ siaj diroj. Veras, ke mi ne kontraŭstaris tiujn diraĵojn kun tiuj de LKKanoj, kaj pro tio mi ne povas certigi, ke tio estas ekzakta. Aliflanke, mi trovis multe da ruzaĵo el kelkaj kubanoj, kiujn mi trovis, kaj ne nur en kongresejo, ĉar mi pasigis aldonan semajnon veturante tra duono de la insulo.

La kongreso mem ne tiom multe diferenciĝis el aliaj kongresoj: ni ĉiam devis porti la kongresan ŝildon, aŭ nin oni ne permesus eniri la ejon, Hotelon Palco (prononcate palko), ĉar ĉiam estis aro da pordistoj kontrolante tion. Mi memoras, ke ger-

manino havis grandan problemon pri tio, kaj oni devigis ŝin iri al alia konstruaĵo trovi iun, kiu devus

Jen plej fama loko
de Havano, Malekon'



doni al ŝi novan ŝildon, kontraŭ pruveco de ŝia identeco. Sed ni estis en Kubo! Tio signifis, ka la koncerna homo ne estis ĉe sia deĵorejo, eble pro tio, ke li aŭ ŝi ne sukcesis trovi ĝustatempe petveturilon, ĉar persona inter-urba veturado en Kubo hodiaŭ kuŝas troe pri turistoj bonkoraj, kiuj petveturigas homojn, al kiu la ŝtato kuba ne provizas per regula transporto. Tio ja povas esti nur

Grisel kaj Adita dancas, dum grupo Amindaj

kantas kaj muzikas.



mia opinio, sed tamen mi kontrolis tion la venintan semajnon, kiam mi per luita aŭto konstatis tion, laŭdire de petgastoj kubaj. Sed tio ja ne estis kulpo de nia germana kunkongresanino, kaj mi tion diris al la zorgantino de la ejo, kie ŝi devus ricevi sian kongresan ŝildon. Mi estis konvinkema, kaj ŝi telefonis kaj diris al ni, ke ni iru al koncerna enirpordo kaj demandi pri koncerna viro, kiun ni devos diri, ke ŝi (mi memoru ŝian nomon) sendas nin. Do ni iris kaj la viro, anstataŭ akompani nin, kiel esperende, simple permesis, ke ni eniru dum li daŭre parolas al kunanto. Ni jam estis ene de la ejo, sed ŝi ne bezonis tiun problemon ĉiun tagon, okaze, ke ŝi ne trovos sian identigilon en hotelo, kie ŝi kredis, ke ŝi lasis aŭ perdis ĝin. Sekve ni iris al homo, kiu solvos tiun aferon. Surprizis min, ke la homon mi konis, ĉar li estas oficiro de UEA, kaj fakte sufiĉe amikema kaj bonkora. Mi klarigis la aferon al li, kaj li petis vidi ŝian pasporton, kiun ŝi bedaŭrinde ankaŭ ne havis kun ŝi. Sed antaŭ li povus diri ion, mi klarigis, ke la antaŭan tagon ŝi kaj mi partoprenis la samajn kongreserojn, kaj mi certigas, ke ŝi estas kongresanino. La viro ridetis iomete malice, kaj donis al ŝi novan identigilon. Post tiumomenta dankado, mi neniam plu

vidis tiun belan germaninon. Sed mi mindemandas pri tio, kio okazus, se mi ne trovus ŝin en la ĝusta momento? Ne mi, sed la kongreso mem devus solvi tiujn problemojn.

Rakontante tiun anekdoton ekster la movado (kaj mi timas, ke eĉ en kelkaj etosoj intermovadaj), oni ne komprenas, ke esperantistoj faras aferojn sen esperi rekompenco. Sed jen la esperantista sinteno, la esperantista spirito de helpo kaj alproksimiĝo al aliaj. Tio estas konstanto inter ni de kiam unuafoje en Buloŝjo-sur-Marŝo kunvenis homoj kun homoj: ni ĉiuj kunvenas ĉiujare, laŭ niaj eblecoj. Nur milito malebligis kongresojn de paco kaj por paco, la esperantaj kongresoj, la solaj kongresoj mondaj sen tradukiloj aŭ tradukantoj. Meritas la penon veni kaj vidi homojn el diversaj kulturoj, kaj konstati, ke ili estas same kiel ni mem, ke iliaj movigoj kaj motivoj estas samaj aŭ similaj al tiuj niaj, ke iliaj sopiroj kaj sukcesoj tiom altgrade similas al tiuj niaj, kaj ke niaj rompitaĵoj kaj revoj estas tiom similaj. Tiel, ni povas komforti kaj komfortigi, samtempe, unu la aliajn. Kaj kune deklari, ke ne ni konsentas kun la nuna stato de aferoj en la mondo, sed tamen ne per perforto ni revas ŝanĝi ilin, ĉar ni ne plu estas batalantoj, sed



laborantoj por paco. Iom post iom, sulko post sulko, ni fosu nian penon kaj celu al nia revo.

Kaj nia revo komencis ĉifoje por kunveno en Havano, lando brila de Karibio, kie, on diris al mi, ŝajnas, ke la tempo haltas, ripozas, kaj pensigas nin pri kien ni iras en la hasto de nia ĉiutaga vivo...

Mi vidis multajn amikojn kaj samideanojn en Havano, inter ili Stano Marĉek. Mi ricevis baton, kiam mi eksciis, ke la registoj de UEA decidis eksoficigi lin kiel redaktoron de nia magazino Esperanto. Mi memoras, ke de kiam mi

UEA niĝis, nia magazino aperis ĝustatempe nur dum Stano estis redaktoro. Do, mi ne komprenas kial oni decidis eksigi lin kiel redaktoron. Ĉu li postulis pli da mono ol UEA kapablas pagi? Se tio estas la kialo, oni klarigu, kaj danku lin, tamen, lian bonan laboron. Sed se estas alia kialo, oni diru al la veraj posendantoj de UEA, ni, la anoj, ĉar la estraro estas nur la adminstrantoj de tio, kio ne estas sia, sed nia. Mi konstatis, ke mia indigno ne estis unika, ĉar aliaj samideanoj jam skribas protestleteron al estraro pro tio, kaj subskribis ĝin multe da aliaj samideanoj, kelkaj el ili eĉ klarigante, ke se Stano ne plu redaktas la magazinon, ili ne plu partoprenos UKn denove.

Pri la ĉefaj eroj de la Kongreso, estis unue la Kongrestemo, **Interproksimigo de kulturoj**, kiel kutime gvidata de Hamfrej Tomkin', la oficialaj



Redaktoroj de *Esperanto* kaj *Kajeroj el la Sudo*.

1Numero 71a, julion 2006, paĝo 16^a, aŭ ankaŭ vidu <http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k71/k71gl.html>

prelegoj de diversaj fakuloj, kaj eĉ la prelego pri la **Gazetoteko Lanti**, kiun unuafoje mi diris en Universala Kongreso, tiel komunikante oficiale al la universalaj esperantistoj pri ĝi. Amuze estis la fakto, ke dum mia prelego mi devis peti de kuba teknikistino, ke ŝi denove ŝanĝu la bildon, kaj finfine mi konfuzis ambaŭ lingvojn, kaj eraris fojfoje inter Esperanto kaj la hispana, ĉefe pro tio, ke kvankam la aŭskultantaro ŝajnis al mi etne hispana, ĝi estis ĉeĥoj, hungaroj kaj de aliaj landoj kies lingvo tute ne rilatas al tiu mia. Ne indas reprodukti ĉi tie tion, kion mi diris, ĉar mian prelegon mi eltiris el artikoloj pri ĝi, kiujn mi jam publikigis en ĉi tiu magazino en la pasinto1.

Ŝokis min vidi, ke la prezidanto de UEA portis tipikajn kostumojn de sia lando en oficialaj eventoj, kiel prelego kaj malfermo de la kongreso. Mi ne

kritikas, ke li tion faru en sia privata vivo kaj agado, sed agante je la nomo de ĉiu esperantisto en la mondo, mi simple ne komprenas tion, ĉar li ne reprezentas Bharaton en la esperantistaro, sed esperantistojn antaŭ la mondo. Mi scivolas pri tio, kiel vestumus la Prezidanto de UEA, se anstataŭ de Bharato, li estus civitano de Ganao, Bolivio aŭ de rezervujo indiana en Usono... Sed mi renoncis diskuti la aferon racie, ĉar samideanino ĉe la UK trovis tion tute normala, kio pensigis min pri la detruantaj efektoj de politika korekto, kiu ne solvas problemojn, sed nur maskas ilin.

Pri aliaj flankoj de la UK mi pridiros en la ceteraj numeroj de 2010.

Elkore,

Jesuo

Venas el paĝo 5^a

al banko preskaŭ la ceteran parton de via vivo monon por hejmo, kiu neniam estos via.

Jen la kosto de via iluzio havi hejmon propran.

Eble vi, alilanda leganto, ne kredos mian kruelan rakonton, kiu ne povus okazi ĉe vi, ĉar ĉe vi oni ekzekutas hipotekon ĉiam kontraŭ la domon, ne kontraŭ la individuo, male al en Hispanio, kaj pro tio eĉ en Usono krizo ruinigas bankojn, sed ĉi tie krizo ruingas ne bankojn, sed homojn. Kaj tio pruvas, ke ankoraŭ Spain is different! (Hispanio malsamas).

Tion konsiderinte, eble tiuj junuloj, kiuj tiom supraĵe voĉdonis por maldekstra genio, venontfoje zorgos multe pli pri tio, kiun caron li aŭ ŝi voĉdonos, por ke li aŭ ŝi regos diktatore supozitan demokration.

Kial progresesemuloj malutilas al tiuj, kiujn ili deziras helpi

Oni scias, ke progresesemuloj estas morale pli bonaj ol ceteraj homoj. Maldekstruloj neniam diskutas; ne estas bezono. Ili ne prezentas argumentojn fronte al aliaj por solvi problemojn aŭ plibonigi situacion. Ili estas nur bonaj homoj, kiuj deziras solvi la problemojn, sed tiuj, kiuj ne konsentas kun ili estas mizeruloj, kiuj volas malbonigi aferojn eĉ pli. Se, ekzemple, oni disuktas pri reformo de sansistemo, estas nur du pozicioj: tia de tiuj, kiuj zorgas pri homoj, ili mem, kaj tiu alia, de tiuj, kiuj estas mizeraj, egoismaj, kiuj permesas, ke homoj mortu ie ajn: tiuj, kiuj ne konsentas kun progresesemuloj. Pri ekologio, oni jam scias, ke unuj volas detrui la planedon, kaj aliaj savi ĝin. Alfronti ĉiun aferon oni povas per diversaj opinioj, komencante de la ideo, ke ni ĉiuj deziras trovi la plej bonan solvon. Por progresemaro tio ne estas tiel: se oni estas dekstrema, tio estas nur por tio, ke oni estas egoisma, defendas privilegiojn, ĝojas pri milito kaj tio, ke la afrikaj geinfanoj malsatu.

Ĉiuj diskutoj venas el tio, ke ekzistas supereco morala en ideoj maldekstraj. Sekvoj estas

mirindaj: oni ne plu devas ribati ideojn, oni nur devas diri, ke ili estas dekstraj ideoj. Oni ne plu bezonas kontraŭstari argumentojn, sed nur montri, ke la kontraŭulo estas en la malluma flanko de vivo: li aŭ ŝi estas dekstra. Peko sen pardono.

Sed estas io eĉ pli malbona: pli ofte ol ne, politikistoj, kiuj reprezentas la voĉdonantojn dekstrajn, kredas tion. El tio venas sia ĉefa strategio ŝajniĝi plej eble kiel maldekstra. Tiu realo kondiĉigas la politikan vivon en Hispanio. La debato putriĝas en sia origino. Maldekstro difinas la paŝon kaj celon, kaj dekstro marŝas survoje.

Kaj tio estas la vera fraŭdo en hispana politiko nuna. Ĉar tiuj ideoj de maldekstro estas tiuj ideoj, kiuj fiaskigis grandan landon en la mondon, Rusio, kiam ĝi iĝis Sovetunio. Ni havas plurajn aliajn ekzemplojn pri malriĉigitaj landoj per maldekstraj ideoj: Kubo, Venezuelo, Vietnamio, eĉ Ĉinio, kiu estus eĉ pli riĉa, se ili ne suferintus la komunisman vitriolon de pli ol duonjarcento.

Ne estas, ke en hodiaŭa Hispanio ne estas gejunuloj kun

Finas en paĝo 15^a

Mesaĝo por Internacia Virina Tago 2011, Hiroŝima

Karaj virinoj en la mondo,

En la nomo de kunveno en Hiroŝima por la Internacia Virina Tago 2011 ni sendas al vi elkoran saluton de amikeco.

Ni, plenuma komitato de la Virina Tago konsistas el 20 organizoj kiuj ĉiutage aktivas en diversaj medioj por egalrajtoj inter viroj kaj virinoj, altigo de virina posteno en la socio, konstruo de socio de komuna partopreno de gevoj, kaj paco.

Ni havos kunvenon por la Internacia Virina Tago la 8-an, marto, 2011 kun la temo "Paco kaj Virinaj vivoj." Ni aŭskultos prelegon, kantojn, kaj spektos filmon, interŝanĝos pri niaj agadoj porpacaj. Krome ni ekspozicios mesaĝojn porpacajn kaj fotojn de virinaj vivoj ĉe publika ekspoziciejo kaj kunvenejo de la Virina Tago.

Historio de la Virina Tago originis en 1907 okaze de manifestacio de virinoj en Novjorko, Usono, postuli panon kaj egalrajton. Virinoj dezirante pli bonan vivon kaj postenon disvastigis agadon por Paco, Egaleco, Disvolviĝo kaj Evoluo. En paco realiĝos plibonaj postenoj de virinoj.

La historio de Internacia

Virina Tago samas al historio de virinoj de Hiroŝima kiuj agadas neniigi nuklearnilojn.

La urboestro de Hiroŝima en 2010 apelis "Perspektivon 2020" cele al neniigo de nuklearniloj ĝis 2020, kaj ni el Hiroŝima luktas por ĝi levi ondojn de internaciaj voĉoj realigi nuligon de nuklearniloj sur la tero.

Ni petas vin doni al ni vian mesaĝon porpacan, kaj informon pri eventoj aŭ agadoj porpacaj en via lando, regiono, municipo aŭ de vi mem. Ni ekspozicios vian mesaĝon ĉe publika ekspoziciejo kaj en la kunveno de la Virina Tago.

S-ino NOBUMASA Ĉieko, Prez. de la Plenuma komitato por la Internacia Virina Tago 2011, Hiroŝima Municipo Hiroŝima.

Kun guberniaj kaj urbaj organizoj:

Arko de Hiroŝima/ Ligo de WE-palaco/ Kina karavano/ Novjapana Virina asocio/ Tutlanda ligo de vartistoj/ Hiroŝima Esperanto-Centro/ Ligo de medicinaj sindikatoj/ Emerita sindikatoj/ Instruista laborsindikato/ Ligo de solaj patrino k infano (urba)/ Laborsindikato de municipaj oficistoj/ Laborsindikato de de urbaj oficistoj/ Ligo de patrinoj/ Ligo de lokaj virinaj asocioj de Hiroŝima/ Ligo de

Finas en paĝo 15^a

Elektronika libro

Ĉi tia diskuto memorigas min pri ĉia diskuto, kiun mi vidis ĉe multaj amasmedioj, inter ili Radio Klasika, tiam nomumita "Radio Du", pri vinilaj diskoj kontraŭ kompakta diskoj je sepdekaj jaroj de la lasta jarcento, kiam tiuj lastaj ankoraŭ estis aperantaj. Mi aŭdis supozitajn ekspertulojn diri, ke vinila estas "pli homeca", kaj kompakta estas "pli malvarma", kvankam mi ne notis iajn aŭn diferencon laŭ la temperaturo inter vinila kaj kompakta diskoj tenante ilin en miaj manoj.

Sed pasante la jaroj, ni lernis ĝui muzikon sen bruo el disko aŭ nadlsalto, kiel okazis antaŭe, kaj eĉ apero de mp3 jam dismalkonatigis tiun sensencan diskuton.


Mi ne diras, ke la diskuto pri elektronika libro estas sensenca, sed la argumentoj, kiujn mi aŭdas pri ili kaj pri paperaj libroj memorigas min pri tiuj aliaj... Eblas, ke oni nomumu min cinika aŭ tro simplisma, sed la vera celo



Libro 511, 32 28

de libroj de libro ne estas, ke oni flaru ilin, aŭ pezigu ilin, aŭ eĉ, ke ili ornamu nian ĉefĉambron. De la Kodo de Hammurabi

ĝis la verkoj de Marko Botella, la celo de libro estas nur tio, kion ties aŭtoro deziras komuniki al ni. Unue oni uzis



kuiritajn koto-tabuletojn en malnova Sumerio. Poste, estis revolucia elpensaĵo, papiro, kiu estis surskribita en longaj roloj, kiujn oni nomumis "volumojn". Jes, ĝi estis grava invento, ĉar se ili falis sur la plankon, ili ne rompiĝis. Mi supozas, ke iu ajn babilonano sopiris nostalgie al tiuj malnovaj tabuletoj de kuirita koto, kiuj enhavis pli da "animo" ol tiu "malvarma" papiro. Multe da tempo poste, teknologiisto trovis alian grandan inventon: papero. Ĝi estis multe pli malmultekosta ol papiro, kaj mezepokaj monaĥoj uzis tunojn da inko reskribante tiujn librojn dikajn kaj grandajn, pri la aferoj, kiujn antikvaj verkistoj deziris diri al ni, tiel ke ni eksciu pri ĝi. Pli, multe pli poste tiu bonulo, Guttenberg trovis la moveblajn tipojn, kaj finfine ni, la plebo, tio estas, ni, finfine ekhavis aliron al libro, ĝis tiam rezervita al ekleziuloj kaj tiuj nobeluloj, kiuj deziris legi ilin. Plej eble guenbergaj libroj ne havis tiom da

"animo" kiel tiuj kopiitaj de monaĥoj permane, ĉar ili estis printitaj de maŝino, al kiu animo mankas; sed dum unu monaĥo kopias unu libron, nur unu presilo produktis dekojn da miloj da libroj. Papero kaj printoteknologio malplikostigis librojn laŭ jarcentoj, ĝis aperis cephaŭta papero je jarcento 20-a. Kaj nun, je jarcento 21-a, oni trovas, ke jam estas finfine libro de papero kaj inko "virtualaj", kiuj estas nek papero nek inko. Sed ni ankoraŭ havas tiun diskuton, ĉu elektronikaj libroj havas pli ĉu malpli da animo ol tiuj tradiciaj libroj, tio estas, surpaperaj, kiujn ni konas de nia tuta vivo, kiuj ofte similas al konstruaj brikoj, ĉefe se oni intencas porti ilin por ferio.

Sed mi opinias, ke se iam libroj havis animon, ili estas ekzakte tiuj misnomitaj "e-books", elektronikaj libroj, ĉar tion dirante, kion ni vere priskribas estas librovidilojn aŭ librolegilojn, ĉar vere ili mem ne estas la libroj, kaj la veraj libroj estas nur la informado, kiujn ili enhavas, kiu okupas neniun fizikan lokon, kiu nek flaras, nek pezas, nek gustumas, nek koloras, kaj vere neniun povus vidi ilin sen tiuj vidiloj. Tio estas, karaj legantoj, tiuj elektronikaj libroj estas tute senkorpaj, kaj sekve ili estas la sola animaj laŭ la tuta historio de

libro!

Kaj tiun libron la modernaj eldonistoj deziras vendi al ni per troigataj prezoj, ĉar se antaŭe kostis multe da mono aperigi libron pro la kostoj de papero, inko, salajroj, distribuado, kaj tiel plu, nun tio, kion ili vendas al ni ili



ne ĉesas havi. De nun ne plu estos elĉerpitaj libroj, ĉar tio, kion oni vendas al ni estas simple la premeson legi ilin. Kaj tio, vere, apartenas nur al la aŭtoro de la libro, ne al eldonisto, kiun oni ne plu bezonas. Sekve la procento, kiun aŭtoro ricevos ne plu estos 1, kiel ĝis nun, sed 100 procento de sia laboro... Mi eksciis antaŭ nelonge, ke la aŭtorino de Tempo inter kudroj, Maria Dueñas, ricevas unu eŭron po vendita ekzemplero, eĉ se ĝi kostas 30 eŭrojn. Nu, elektronika libro ebligas ke mi sendu unu eŭron al la aŭtorino pro la permeso legi ŝian libron kie ajn mi trovos ĝin, eble en ŝia propra retpaĝo. Kaj se mi trovas ĝin valora, mi ankaŭ

povos sendi al ŝi pli da mono, eble la tutan kvanton de 30 eŭroj, cele al tio, ke ŝi ne ĉesu krei tiom belajn kaj indajn librojn, kiel tiu ĉi, kaj ke ŝi vidu, ke la tempo, kiun ŝi dediĉas al tiu laboro, ne estas tempo perdita.


Sed eldonistoj kaj aliaj mercenaroj de arto ne devus gajni tiom multe pli da mono ol la kreintoj. Certe ne tridekoble ol verkistoj. Kaj aldone, ili daŭre postulas, ke oni pagu al ili monon pro al ebleco, ke oni uzu la modernajn amsmediojn, kiel interreton, por "pirati" tiujn librojn, kiujn ili neniam verkis..., sed kies aŭtoroj estis devigitaj subskribi maljustajn kaj troigajn kontraktojn se ili volis publikigi. Bonŝance, elektronika eldonado povas ŝanĝi tion.

Elektronika libro, sekve, ne nur estas la animo de librovidiloj, sed ankaŭ povas esti la armilo per kiu aŭtoroj povas senbalastigi arton el regreso.

Sed eĉ se mi vidas tiom klare, ke tiu estas la nova maniero legi librojn, eĉ tiujn librojn, kiujn mi neniam havis sufiĉe da mono aĉeti, mi ne antaŭe aĉetis vidilon, ĉar mi scias, ke ne estas sola sistemo, ununura formato por elektronikaj libroj, kaj mi ankoraŭ memoras la "formata ĥaoso", kiun oni suferis antaŭ ne longe pri la diversaj formatoj pri vidbendoj.

Tiam mi aĉetis vidbendregistrilon laŭ la formato, kiun mi kredis, ke estos definitiva, ĉar ĝi sonis plej bone, la imagkvalito ne estis malpli bona ol tiu de la aliaj, kaj je la fino de la bendo, oni povis remeti ĝin inverse, tiel ke oni povos uzi la saman bendon por denove registri: Sistemo 2000. Sed eĉ se oni asertis tiam, ke Betamax estus la venkinto, finfine estis VHS tiu, kiu sukcesis. Kaj sekve mia investo, granda investo de ĉirikaŭ du mil eŭroj, tiamaj ducent septdek mil pesetoj, estus mono en rubujon..., se ne estus nun tiuj scenoj pri la infanaĝo de miaj gefiloj!


Tial mi atendis ĝis kiam la panoramo klariĝos, kaj ni vidos kiun sistemon oni vaste uzas kaj sekve malplikostiĝas pleje, uzante



dume la legoformaton PDF, kiun oni jam adoptis laŭmonde por legi ĉe komputilaj ekranoj. Sed mi lernis, ke ĉiuj librovidiloj elektronikaj uzas ekzakte tiun formaton, PDF, kaj sekve mi reviziis mian opinion pri tio, kaj aĉetis la plej malmultekostan

elektronikolibrovidilon Papyre 5.1. Ne pro tio, ke ĝi estas pli bona ol aliaj, sed pro tio, ke ĝi kostas malpli ol iu ajn alia, kiun mi trovis. Ĝi venis kun memortableto, kiu enhavas 1000 librojn, kaj ankoraŭ havas lokon por aliaj 1000. Kaj mi trovis inter ili multe da libroj, kiujn mi ĉiam deziris legi, sed ne povis, ĉar mi ne havis

sufiĉe da mono por aĉeti ilin. Inter ili rangas la verkojn de Platono, Aristo, Galdos, kaj centoj da aliaj, kiuj ne plu estante la kostoj de papero kaj printado, oni povas senĝene kaj senkontraŭleĝe senpage kunhavi kaj disvastigi pro tio, ke ties aŭtoroj mortis antaŭ tiom multe da tempo, ke ne plu eblas, ke oficistoj, kiuj neniam kreis ion ajn, sukcesu postuli monon pro ili laŭ argumento de "rajtoj de aŭtoro".



Venas el paĝo 10^a propraj, novaj ideoj pri la plibonigo de niaj ekonomio kaj socio. Estas, ke ili ne kuraĝas diri laŭte, ke ili estas dekstruloj, kiuj laboras por plibonigo de nia lando. Iliaj povas esti eraraj proponoj, sed ja estas la laboro de parlamento, diskuti kaj konvinki, aŭ konvinkiĝi, pri plej bonaj ideoj. Tamen tio postulus, ke gedeputitoj estu honestaj reprezentantoj, kiuj rifuzu fian disciplinon de partio kaj voĉdonu laŭ siaj konsciencoj, kaj ne laŭ la konvenoj de siaj partioj.



Venas el paĝo 11^a virinaj asocio WENET/ Ligo de komercistoj/ Virina demokrata klubo/ YWCA/ Hirosima Eduka-Centro por Virinoj.

Limdato kaj aliaj: ĝis la 20a, feb. 2011. Maksimume sur unu leterpapero A-4 formata. Ankaŭ viroj rajtas skribi al ni. Kun notoj petataj: Nomo, sekso, aĝo se eble, profesio, loĝloko (urbonomo), lando. Kontaktoadreso: OSIOKA Taeko

osioka @mua.biglobe.ne.jp
Oogonzantyo 7-15, Minami-ku,
Hirosima, 734-0041 Japanio.

Osioka Taeko

La kazo pri Kajeroj

Antaŭ ne longe mi ankoraŭ legis en interreto mensogojn pri nia magazino, kiujn ja tudas min korekti, ĉar estas evidente kie estis la origino kaj la kialoj politikaj de tiuj fifamigoj.

Sed mi ne povas ne pensi pri la afero, ke iam estis ĉirkaŭ cento da esperantistoj, kiuj mone subtenis HALEn kaj nian magazinon, kaj nun ili ŝajnas for. Politiko, jes, estis unu kaŭzo, sed estas pli.

De unu flanko, estas tiuj homoj, kiuj konsideras sin maldekstraj ĉefe pro tio, ke ili ne scias pri kio temas maldekstro. Oni konsideras ade en nia lando, ke maldekstro estas progreso, kaj progreso estas bona afero, kiu celas plibonigi vivon de ĉiuj popoloj. Tamen, realo pruvas male: post du progresemaĵoj, maldekstraj periodoj en la registaro kaj parlamento de Hispanio (jen danĝero pri tio, ke parlamento elektu registaron), oni vidas, ke ne ĉiuj hispanoj pliboniĝis en sia vivo, se ekonomia plifaciligo estas pliboniĝo. Oni vidas, ke socialismaj ministroj, kiel Bono aŭ Pajin, ekonomie pliboniĝis, sed kvardek po cento da hispanoj ricevas ĉirkaŭ 800 eŭrojn, kaj plej ofta salajro en Hispanio estas malpli ol 1 000 eŭroj. Dume, parlamentano ricevas pli ol 6 000, kaj tio estas skandalo. Pli grava skandalo estas, ke se parlamentano ne iras labori, li aŭ ŝi devas klarigi nenion, male al simpla laboristo, sed se li aŭ ŝi ja iras al parlamento, aldonan kvanton da mono li aŭ ŝi ricevas. Ĉiun tagon ni legas pri nova ekonomia skandalo de politikisto, de ajna politika partio. Tio ne pruvas, ke socialistoj estas pli honestaj aŭ malhonestaj ol alipartianoj, sed nur, ke ne la homoj, sed la tuta sistemo politiko de Hispanio estas korupta denaske. Tio ne estas nova problemo, ĉar jam filozofo Plato pridiskutis ĝin en siaj verkoj: demokratio povas iĝi demagogion kaj koruptecon. Ni pensigis pri tiuj aferoj ĉi tie, kaj anstataŭ diskuti niajn argumentojn, kelkaj samideanoj decidis, ke ni estas "ekstremdekstruloj", kaj pro tio decidis eviti nin. Sed ekstremdekstruloj ne defendas, laŭ mia kono, respekto por libereco kaj bazaj rajtoj de homoj, rajtoj, kiuj estas denaskaj, sengrave al tio, kion la koncerna ideologio pli-malpli bonisma diru.

De la alia flanko, la etoso en kiu nia magazino moviĝas de kelkaj jaroj estas atea kaj religie kaj politike. Ĉar ne sufiĉas diri, ke dio ne ekzistas por ke tio estu vera. Se dio ne ekzistas, oni ne povas vivi kvazaŭ morgaŭ estu la fino de la mondo kaj ni devos diri al solena barbulo pri tio, kion ni faris kun nia vivo, kaj kial ni ne senĉese laŭdis Lin kaj nome

de li faris ĉion, kion ni faris, ĉu bonaj ĉu malbonaj agoj. Kaj se oni sukcesis ne vivi tiel, oni ankaŭ ne vivu laŭ aliaj dogmoj. Politikaj dogmoj estas eĉ pli fiaj ol tiuj religiaj, ĉar religio funde entenas senson pri moralo aŭ etiko, sed politiko tute fremdas al moralo aŭ etiko, laŭ tio, kion oni vidas kaj vidis en la historio de la nacioj, inkluzivante tiu nia. La celoj, oni vidas, rajtigas la rimedojn. Kaj tio estas tute falsa, ĉar pli ofte ol ne, la rimedoj fiigas la celon. Oni povas vidi, ke la noblan celon pagi pli altan salajron kaj plibonigi la vivnivelon de laboristoj kaj socialajn konkerojn oni ne atingis en Hispanio dum la nuna rego de la registaro, ĉar mankas mono. Kaj mankas tiom multe, ke eĉ la antaŭajn kondiĉojn oni ne povas daŭrigi, kaj nun, unuafoje en la historio de la lando, la salajroj malkreskiĝas. Oni diras, ke tio estas sekvo al nuna krizo monda, sed tio estas nur malmultekosta mensogo: aliaj landoj jam eliras la krizon, kaj ili ne devis malplialtigi la salajrojn de la laboristoj. Sed ili ne havis tion, kion ni havas ĉi tie: socialisman registaron.

Pro tio, ke ni opinias kvazaŭ ne nur ne ekzistas dio, sed ankaŭ kvazaŭ la dogmoj de maldekstruloj estas stultaĵoj, kaj ilia rifuzo debati kaj argumenti nur esprimas pri kripligita kulturo kaj malferma malkuraĝo, tiuj homoj, kiuj ankoraŭ revas pri paradizoj sur tero ne deziras legi nin, kaj rifuzas subteni nin, en la vana espero, ke ni malaperu. Espereble aliaj homoj, tiuj, kiuj komprenas, ke paradizo ne estas senkostaj, tiuj, kiuj opinias, ke ĉiutaga laborado alportas al ni pli bonan kaj justan mondon, kie indas vivi, eĉ se ĝi ne estas paradizo donacita de senkohera dio al pigraj estaĵoj, kiuj meritas nenion, krom glavon de anĝelo pro sia stultaĵo. Ankaŭ maldekstraj dioj, pioj kaj doktrinoj ne paradizigos ĉi tiun mondon, la solan, kiun ni povos ĝui, sed male, se ni ne estas multe pli zorgemaj, sub la standardo de maldekstro kaj progreso, elstarigitaj politikistoj ade riĉiĝos kaj malaperos. Tiel okazis en la pasinto, kaj okazas en la estanto. Ni ne bezonas diojn, ni ne bezonas revovendantojn, sed nur labori ĉiun tagon por atingi pli bonan kaj justan mondon, kie indos, ke oni vivu.

Jen la ĉeestantaro, kiun **Kajeroj el la Sudo** serĉas kaj finfine havos. Nia magazino ne plu estas bonisma, kaj ne plu kontentos bonismulojn, sed ĝi estu laborema kaj esperanta, kiel decas al laboristoj esperantaj de Hispanio kaj aliloke.

La faraono

Ĉapitro 28

Kiam vespere la pastroj kaj al kronprinco revenis en la korton, oni ekbruligis kelkcenton da torĉoj. Fariĝis lume kiel en hela tago.

Mefres faris signon. Ree eliris procesio de muzikistoj, dancistinoj kaj malsuperaĵoj, portantaj la statuon de l' diino Hator kun bovina kapo. Kiam oni forpelis la malbonajn spiritojn, Pentuer komencis sian predikon:

«Vi vidis, noblaj sinjoroj, ke de l' tempoj de la dinastio 19^a ni perdis cent mil mezurojn da tero kaj du milionojn da loĝantoj. Tio klarigas, kial la enspezoj de l' ŝtato malpligrandiĝis je tridek du mil

talentoj, kaj pri tio ni ĉiuj scias. Sed tio estas nur la komenco de la malfeliĉoj de Egipto kaj de l' trezorejo. Ŝajne ja restas ankoraŭ alia sankteco naŭdek ok mil talento da enspezoj. Ĉu vi kredas, ke la faraono ricevas ĉi tiun tutan enspezon?»

«Kiel ekzemplon mi rakontos al vi, kion lia ekscelenco Herhor malkovris en la provinco de leporoj.

«En la tempoj de la dinastio 19-a loĝis tie dudek mil homoj, kiuj pagis jare tricent kvindek talentojn da impostoj. Hodiaŭ loĝas tie apenaŭ dek kvin mil, kaj ili kompreneble pagas nur ducent septdek talentojn. Sed la faraono, anstataŭ ducent septdek, ricevas nur cent sepdek talentojn!

«Kial?», demandis Herhor, kaj jen kion montris la juĝa esploro:

«En la tempoj de la dinastio 19-a estis en la provinco cent oficistoj, kaj ili ricevados po cent draĥmoj da jara salajro. Hodiaŭ sur la sama teritorio, malgraŭ la malgrandiĝo de la loĝantaro, estas tie preskaŭ ducent oficistoj, kiuj ricevas po du mil kvincent draĥmoj.»

Kotizontoj

estos la solaj homoj, kiuj ricevos ĉi tiun magazinon ĉe si per surpapera versio.

Antaŭ nelonge ni pledis, ke la sola maniero protekti nian magazinon kaj asocion estas per kotizoj, sed laste ne multe da samideanoj elektis pagi por ke nia magazino kaj asocio, HALE, ne malaperu. Ni ne bezonas monon aperigi **Kajerojn el la Sudo**, sed iom da subteno helpas aperigi ĝin akurate.

Lia ekscelenco Herhor ne scias, ĉu same estas en ĉiu provinco. Sed do esta certa, ke la trezorejo de la faraono anstataŭ naŭdek ok havas ĉiujare nur sepdek kvar talentojn.

«Diru, sankta patro: kvindek mil...», intermetis Ramzes.

—Ankaŭ tion mi klarigos—, respondis la pastro. —En ĉiu okazo memoru, princo, ke la faraona trezorejo pagas nun dudek kvar mil talentojn al la oficistoj, dum en la tempoj de la dinastio 19-a ĝi elspezadiis nur dek mil.

Granda silento regis inter la eminentuloj: pli ol unu el ili havis parencon oficiston, kaj bone pagatan.

Pentuer estis sentima.

«Nun», diris li, —mi montros al vi, kronprinco, la vivon de la oficistoj kaj la sorton de la popolo en la antikvaj tempoj kaj hodiaŭ.

«Ĉu tio ne estas perdo da l' tempo? Tion ja ĉiu povas mem vidi», murmuris la pastroj.

«Mi deziras tion scii», diris firme la kronprinco.

La murmuro eksilentis. Pentuer iris sur la ŝtupoj de l' amfiteatro malsupren en la korton, kaj post li la princo. Mefres kaj la ceteraj.

Ili haltis antaŭ longa kurteno el matoj, kiu formis kvazaŭ ĉirkaŭbaron. Pentuer faris signon. Alkuris dekelko da junaj pastroj kun hele brulantaj torĉoj. Dua signo, kaj unu parto de l' kurteno falis.

El la buŝoj de l' ĉeestantoj leviĝis krio de miro. Ili havis antaŭ si vivantan bildon, en kiu partoprenis ĉirkaŭ cent figurantoj.

La bildo estis dividita en tri etaĝojn malsupran, kie staris terkulturistoj, mezan kun la oficistoj, kaj supran, kie estis ora trono de l' faraono, apogita sur du leonoj, kies kapoj servis kiel seĝaj brakoj.

«Tiel estis dum la dinastio 19^a», diris Pentuer. «Rigardu la kamparanojn. Ĉe iliaj plugiloj vi vidas bovojn aŭ azenojn iliaj pioĉoj kaj ŝoveliloj estas bronzaĵoj, sekve fortikaj. Rigardu, kiaj fortikaj homoj! Hodiaŭ oni povas renkonti tiajn nur en la gtvardio de lia sankteco. Potencaĵoj brakoj kaj kruroj, heroaj brustoj, ridetantaj vizaĝoj. Ĉiuj estas oleitaj, banitaj. Iliaj edzinoj preparas nutraĵojn aŭ vestojn: iliaj infanoj ludas aŭ lernas.»

La tiama kamparano, kiel vi vidas, manĝis tritikan panon, fazeolon, fiŝojn kaj fruktojn, trinkis bieron kaj vinon, kaj rigardu, kiel belaj estis la kruĉoj kaj pladoj! Rigardu la kufojn,

antaŭtukojn kaj mantelojn de l' viroj: ĉio estas ornamita per diverskoloraj brodaĵoj. Ankoraŭ pli bele estas broditaj la ĉemizoj de l' virinoj... kaj ĉu vi vidas, kiel zorge ili kombis sin, kiajn pinglojn ili portis, kiajn orelingojn kaj braceletojn? Ĉi tiuj ornamoj estas faritaj el bronzo kaj kolora emajlo, sed vi povas renkonti ankaŭ oron, almenaŭ orajn fadenojn.

Levu viajn okulojn supren, al la oficistoj. Ili portas mantelojn, sed ĉu kamparano havas saman en festaj tagoj. Ili sin nutras, same, kiel la kamparanoj, tio estas, sufiĉe, sed simple. Iliaj mebloj estas pli elegantaj ol tiuj de l' kamparanoj, kaj pli ofte oni renkontas en iliaj bestoj orajn ringojn. Ili vojaĝas sur azenoj aŭ en veturiloj tirataj de bovoj.

Pentuer frapis la manojn kaj movado ekregis en la vivanta bildo. La kamparanoj komencis doni al la oficistoj korbojn da vinberoj, sakojn da hordeopizo kaj tritiko, kruĉojn da vino, biero, lakto kaj mielo, grandan kvanton da ĉasaĵo kaj teksaĵojn blankajn kaj kolorajn. La oficistoj akceptis la produktojn, parton lasis al si, sed la objektojn plej belajn kaj multekostajn ili puŝis supren, al la trono. La etaĝo, kie estis la simbolo de la faraona povo, estis superŝutita

per produktoj, kiuj formis kvazaŭ monteton.

«Vi vidas, respektindaj», daŭrigis Pentuer, «ke en la tiamaj tempoj, kiam la kamaranoj estis sataj kaj ne senavaj, la trezorejo de la faraono apenaŭ povis enteni la oferojn de l' regnantoj. Kaj nun rigardu! kio estas hodiaŭ...

Nova signalo. Falis la dua parto de l' kurteno kaj aperis alia bildo, en la ĝeneralaj trajtoj simila al la unua.

«Jen estas la nunaj kamparanoj», diris Pentuer kaj en lia voĉo sonis ekscito. «Ilia korpo konsistas el la haŭto kaj ostoj, ili ŝajnas malsanaj, estas malpuraj kaj ne oleas sin plu. Anstataŭe iliaj dorsoj estas vunditaj per la bastonoj.

«Oni ne vidas ĉe ili bovojn aŭ azenojn, ĉar al kio servus la brutoj, se la plugilon trenas iliaj infanoj kaj edzino? Iliaj pioĉoj kaj ŝoveliloj estas lignaj, kaj tiaj iloj facile difektiĝas kaj pligrandigas la laboron. Vestojn ili tute ne posedas, nur la virinoj portas dikajn ĉemizojn kaj eĉ en la sonĝo ne vidas brodaĵojn, per kiuj sin ornamis iliaj avoj kaj avinoj.

«Rigardu: kion manĝas la kamparano. Ifoje hordeon kaj sekititajn fiŝojn, ĉiam lotusajn grajnoj,

malofte tritis platan kukon, neniam viandon, bieron aŭ vinon. Vi demandas: kie malaperis liaj vazoj kaj mebloj? Li havas neniajn, ekster la kruĉo por akvo, ĉar kie li metus ilin en la truon, en kiu li loĝas?

«Pardonu al mi tion, al kio mi nun turnos vian atenton. Tie kelke da infanoj kuŝas sur la planko: tio signifas, ke ili mortis. Estas stranga afero, kiel multe da infanoj de l' kamparanoj mportas nun de malsato kaj laboro! Kaj tiuj estas la plej feliĉaj: ĉar la aliaj, kiuj restas vivantaj, iras sub la batonon de l' intendantoj aŭ estas vendataj al fenicianoj, kvazaŭ ŝafidoj.

La emocio rompis lian voĉon. Li ripozis momenton kaj daŭrigis meze de la kolera silento de l' pastroj:

«Kaj nun rigardu la oficistojn: kiel fortikaj il iestas, rozaj bele vestitaj! Iliaj edzinoj portas orajn braceletojn kaj orelingojn kaj tiel delikatajn vestojn, ke la princoj povus envii al ili. Ĉe la kamparanoj oni ne vidas bovon aŭ azenon: kontraŭe la oficistoj vojaĝas sur ĉevaloj aŭ en portiloj. Ili trinkas vinon kaj nur bonan vinon.

Li ekfrapis la manojn kaj ree fariĝis movado. La kamparanoj komencis

doni al la oficistoj sakojn da greno, korbojn da fruktoj, vinon, bestojn... Ĉi tiujn objektojn la oficistoj, kiel antaŭe, metis ĉe la trono, sed en multe malpli granda kvanto. Sur la reĝa etaĝo ne estis plu monteto da produktoj. Kontraŭe la etaĝo de la oficistoj estis superŝutita.

«Jen estas la nuna Egipto», diris Pentuer. «Mizeraĵ kamparanoj, riaj skribistoj, la trezorejo ne tiel plena kiel antaŭe. Kaj nun...

Li faris signon kaj okazis io neatendita. Iaj manoj komencis forpreni grenon, fruktojn kaj tesksaĵojn de la etaĝoj de la faraono kaj de l' oficistoj. Kaj kiam la kvanto da komercaĵoj tre malgrandiĝis, la samaj manoj komencis kapti kaj forkonduki kamparanojn, iliajn edzinojn kaj infanojn...

La spektatoroj rigardis kun miro la strangajn agojn de la misteraj personoj. Subite ili ekkriis:

«Tio estas fenicianoj! Ili tiel rabas nin!

«Jes, sanktaj patroj», diris Pentuer. «Tio estas la manoj de fenicianoj, kaŝitaj inter ni. Ili rabas la reĝon kaj la skribistojn, kaj la kamparanojn ili sklavigas, kiam al la kompatindaj restas nenio.

«Jes! Ŝakaloj! Malbeno al ili! Oni devas forpeli la kanajlojn!», kriis la pastroj. «Ili plej multe malutilas la ŝtaton.

Sed ne ĉiuj tiel kriis. Kiam ĉio eksilentis, Pentuer ordonis porti la torĉojn en alian parton de la korto kaj kondukis tien siajn aŭskultantojn. Tie estis neniam vivantaj bildoj, sed kvazaŭ industria ekspozicio.

«Bonvolu ekrigardi», diris li. «Dum la dinastio 19a tiujn ĉi objektojn alsendadis al ni la eksterlanduloj: el la lando Punt ni havis parfumojn, el Sirio oron, ferajn armilojn kaj militajn veturilojn. Jen ĉio.

Sed tiam Egipto produktis... Rigardu tiujn ĉi grandegajn kruĉojn: kiom da formoj kaj koloroj!

«Aŭ la meblojn: ĉi tiu seĝo estas inkrustita per dek mil pecoj da oro, perlamoto kaj kolora ligno. Rigardu la tiamajn vestojn: kiaj brodaĵoj, kia delikateco de l' teksaĵoj, kiom da koloroj! Kaj la bronzaĵoj, glavoj, pingloj, braceletoj, orelringoj, agromoniaj kaj metiaĵoj! Ĉion ĉi oni faris ĉe ni du la dinastio 19^a.

Li transiris al alia grupo.

«Kial hodiaŭ, rigardu: la kruĉoj estas malgrandaj kaj preskaŭ sen

ornamoj, la mebloj simplaj, la teksaĵoj maldelikataj kaj unutonaj. Neniu el la nunaj produktoj povas esti komparata kun la tiamaj rilate la grandecojn, fortikecon kaj berlecon. Kial?

Li iris kelke da paŝoj antaŭen kaj ĉirkaŭita de la trorĉoj diris:

«Jen estas la granda nombro da komercaĵoj, kiujn liveras al ni fenicianoj el diversaj partoj de l' mondo. Kelkdelko da parfumoj, koloraj vitroj, mebloj, vazoj, teksaĵoj, veturiloj..., ĉio ĉi venas al ni el Azio kaj estas aĉetata de ni.

«Ĉu vi komprenas nun kial fenicianoj forprenadis de la skribistoj kaj faraono grenon, fruktojn kaj brutojn? Por tiu fremdaj produktoj, kiuj ruinigis niajn metiistojn, kiel la akrido la herbon.

La pastro momenton ripozis kaj daŭrigis:

«Inter la komencaĵoj liverataj de fenicianoj al la faraono, nomarĥoj kaj skribistoj, la unuan lokon okupas la oro. Ĉi tiu speco de komerco estas la plej bona bildo de la malfeliĉoj, kiujn azianoj altiras al Egipto.

«Se iu prenas de ili unu talenton da oro, li devas post tri jaroj redoni al ili du talentojn. Sed plej ofte fenicianoj

sub preteksto malgrandigi la embarason de l' ŝuldanto, jene asntataŭas la pagon: la ŝuldanto por ĉiu pruntita talento, farmdonas al ili, por tri jaroj, du mezurojn da tero kun tridek du homoj...

«Rigardu tien, ekselencoj, «diris li, montrante la pli bone limigitan parton de l' korto. «Tiu kvadrato da tero, cent okdek paŝojn longa kaj larĝa signifas du mezurojn: la grupo de viroj, virinoj kaj infanoj prezentas ok familiojn. Ĉio ĉi kune, la homoj kaj tero, iras en teruran sklavecon por tri jaroj. Dum tiu ĉi tempo ilia posedanto, faraono aŭ nomarĥo, havas de ili nenian profiton: kaj kiam pasos la tri jaroj, ili reprenas la teron elĉerpitan kaj la homojn..., ne pli multe ol dudek. La aliaj pereis en la turmentoj.

La ĉeestantoj murmuris de teruro.

«Mi diris, ke du mezurojn da tero kaj tridek du homojn prenas feniciano por tri jaroj, se ili pruntas unu talenton da oro. Rigardu, kia peco da tero estas kaj kia aro da homoj, kaj nun ekrigardu mian manon...

«La ora peco, kiun mi tenas, malpli granda ol kokina ovo, estas unu talento!

«Ĉu vi taksas, ekselencoj, la tutan

malhonestecon de fenicianoj en tia komerco? Ĉi tiu malgranda peco da oro en la realeco posedas neniajn maltrankvilajn ecojn: ĝi estas flava, peza, ne rustas, jen ĉio. Sed la homo ne povas sin vesti per oro, nek kvietigi la malsaton, aŭ soifon. Se mi posedas amason da oro, grandan kiel piramido, mi estus ĉe ĝi same mizera, kiel libiano, erarvaganta en la okcidenta dezerto, kiam li ne havas daktilojn, nek akvon.

«Kaj rigardu, por peceto de tiu ĉi senutila aĵo feniciano prenas pecon da tero, kiu povas nutri kaj vesti tridek du homojn, kaj krom tio li prenas ankaŭ ilin! Dum tri jaroj li ekspluatas la estaĵojn, kiuj scias kulturi, semi kaj rikolti, fari farunon kaj bieron, teksu vestojn, konstrui domojn, fabriki meblojn...

«En la sama tempo faraono aŭ nomarĥo dum tri jaroj estas senigita je la servoj de tiu ĉi homoj. Ili ne pagas al li impostojn, ne portas ŝarĝojn post la armeo, sed laboras por la profito de avida feniciano.

«Ĉu vi scias, ekselencoj, ke en la nuna tempo ne ekzistas jaro, en kiu en tiu aŭ alia nomeso ne eksplodas ribelo de kamparanoj, konsumitaj de la malsano, troŝarĝitaj per la laboro,

batataj per la bastonoj? Unu parto de ĉi tiuj homoj pereas, aliaj estas sendataj en minejojn, kaj la loĝantaro pli kaj pli malgrandiĝas nur tial, ke feniciano donis al iu pecon da oro! Ĉu oni povas imagi pli grandan malfeliĉon, kaj ĉu en tiaj kondiĉoj Egipto ne perdos ĉiujare teron kaj homojn? La feliĉaj militoj ruinigis nian landon, sed la fenicia ora komerco finmortigos ĝin.

Sur la vizaĝoj de l' pastroj oni povis legi kontentecon: ili pli volonte aŭskultis pri la trompemo de fenicianoj, ol pri la lukso de l' skribistoj.

Pentuer ripozis momenton, poste li turnis sin al la princo.

«De kelke da monatoj», diris li «kun maltrankvilo vi demandas, dia servisto Ramzes: kial malgrandiĝis la enspezoj de lia sankteco? La saĝo de l' dio montris al vi, ke malgrandiĝis ne nur la trezoroj, sed ankaŭ la armeo, kaj ke ambaŭ ĉi tiuj fontoj de la reĝa potenco malgrandiĝados senĉese. Kaj tio finiĝos per plena ruino de la ŝtato, aŭ la ĉielo sendos al Egipto monarĥon, kiu haltigos la fluon de la malfeliĉoj, kiuj de kelke da jarcentoj superverŝas la patrujon.

«La trezorejo de l' faraonoj estis plena, kiam ni havis multe da tero

kaj da loĝantoj. Oni do devas forŝiri de la dezerto la fruktodonajn terojn, kiujn ĝi englutis, kaj liberigi la popolon de la ŝarĝoj, kiuj malfortigas kaj malgrandigas la loĝantaron.

La pastroj ree komencis maltrankviliĝi de timo, ke Pentuer ne parolu duan fojon pri la skribistoj.

«Vi vidis, princo, per viaj propraj okuloj kaj ĉe atestantoj, ke en la epoko, kiam la popolo estis sata, bela kaj kontenta, la reĝa trezorejo estis plena. Sed kiam la popolo fariĝis mizera, kiam la virinoj kaj infanoj devis sin jungi al la plugilo, kiam la lotusaj grajnoj anstataŭis la tritikon kaj viandon, la trezorejo malriĉiĝis. Se do vi volas alkonduki la ŝtaton al tia potenco, kian ĝi posedis antaŭ la militoj de la dinastio 19^a, se vi deziras, ke la faraono, liaj skribistoj kaj armeo naĝu en riĉaĵoj, ceritgu al la lando longan pacon, kaj al la popolo bonan staton. La maturaj homoj ree manĝu viandon, kaj portu broditajn vestojn, la infanoj anstataŭ ĝemi sub la vipoj kaj morti de laboro, ludu aŭ lernu.

«Memoru fine, ke Egipto portas sur sia brusto venenan serpenton...

La ĉeestantoj aŭskutis kun atento kaj timo.

«Ĉi tiu serpento, kiu suĉas la sangon de la popolo, la riĉaĵojn de la nomarĥoj, la potencon de l' faraono, estas fenicianoj!

«For ilin!», kriis ĉeestantoj. «Oni devas nuligi ĉiujn ŝuldojn. Oni ne enlasu plu iliajn komercistojn kaj ŝipojn.

Kvietigis ilin la ĉefpastro Mefres, kiu kun larmoj en la okuloj sin turnis al Pentuer:

«Mi ne dubas, ke per via buŝo parolis al ni la sankta Hator. Ne nur tial, ke homo ne povus esti tiel saĝa kaj ĉioscia, kiel vi, sed ankaŭ tial, ke mi rimarkis super via kapo flametojn en formo de kornoj.

«Mi dankas vin pro al grandaj vortoj, ker kiuj vi dispelis nian nescion. Mi benas vin kaj petas la diojn, ke ili nomu vin mia posteulo, kiam mi estos alvokita al ilia juĝo.

Longa akلامo de l' aŭskultantoj aprobis la benon de l' ĉefpastro. La pastroj estis tion pli kontentaj, ke senĉese pendis super ili timo, ke Pentuer ree tuŝos la demandon pri skribistoj. Sed la saĝulo sciis esti modera: li montris la internan vundon de l' ŝtato, sed li ne flamigis ĝin, kaj tial lia triumfo estis plena.

La princo Ramzes ne dankis

Pentueron: li alpremis lian kapon al sia brusto. Neniu dubis, ke la prediko de l' granda profeto ekskuis la koron de la kronprinco, kaj ke ĝi estas grajno, el kiu povas elkreski la gloro kaj feliĉo de Egipto.

En la sekvinta tago Pentuer, sen adiaŭo, ĉe la leviĝo de la suno forlasis la templon kaj forveturis Menfison.

Ramzes dum kelke da tagoj parolis kun neniu: li sidis en la ĉelo, aŭ promenis en la ombraj koridoroj kaj meditis.

En la fino de l' finoj Pentuer diris nenion novan: ĉiuj plendis pri la malkresko de la teroj kaj loĝantaro en Egipto, pri la mizero de l' kamparanoj, pri la maljusteco de la skribistoj kaj malhonesteco de fenicianoj. Sed la prediko de la profeto ordigis liajn senordajn sciojn, donis al ili palpeblajn formojn kaj pli bone lumigis kelkajn faktojn.

Fenicianoj ekteruris lin: la princo ne komprenis ĝis nun la grandegon de la malfeliĉoj, kaŭzataj de ĉi tiu popolo al la ŝtato. La teruro estis tiom pli forta, ke li ja mem siajn proprajn kamparanojn farmdonis al Dagon kaj estis atestanto, kiel la bankiero reprenis la ŝuldojn!

Se la fakto, ke la princo sin trovis implikita kun la malhonesteco de fenicianoj alkondukis al stranga rezultato: Ramzes ne volis pensi pri ili, kaj kiom da fojoj ekflamis en li kolero kontraŭ ĉi tiuj homoj, tiom da fojoj estingis ĝin la sento de l' honto. Ĉu li ne estis parte ilia kunulo?

Kontraŭe, la princo bone komprenis la gravecon de la malgrandiĝo de l' teritorio kaj loĝantaro, akj pri tio li precipe insistis en siaj meditoj.

«Se mi posedus», diris li al li mem, «la du milionoj da homoj, kiujn Egipto perdis, oni povus kun ilia helpo repreni de la dezerto la fruktodonajn terojn, eĉ pligrandigi la teritorion. Kaj tiam, malgraŭ fenicianoj, niaj kamparanoj vivus pli bone kaj plingrandiĝus la enspezoj de la ŝtato.

Sed kie preni la homojn?

Okazo inspiris al li la respondon. Foje vespere, promentante en la ĝardeno de l' templo, la princo renkontis aron de sklavoj, kiujn la generalo Nitager kaptis sur la orienta limo kaj sendis al la diino Hator. Ĉi tiuj homoj estis bone konstruitaj, laboris pli multe ol

egiptanoj, kaj ĉar oni bone ilin nutris, ili eĉ estis kontentaj je sia sorto.

Kiam la princo rigardis ilin, fulmo eklumigis lian animon: de la emocio li preskaŭ perdis la konscion. Egipto bezonas homojn, multe da homoj, centojn da miloj, eĉ milionon, aŭ du milionojn. Kaj jen ili estas! Oni devas nur invadi Azion, preni ĉion, kion oni renkontos sur la vojo, kaj sendi Egipton. Kaj ne fini la militon pli frue, ol oni kolektos tiom, ke ĉiu egiptano havos sian sklavon.

Tiel naskiĝis plano simpla kaj kolosa, dank' al kiu la ŝtato devis akiri loĝantaron, la kamparanoj helpantojn en la laboro kaj la trezorejo de l' faraono fonton de enspezoj, neniam sekiĝantan.

La princo estis ravta, kvankam en la sekvinta tago vekiĝis en li nova dubo.

Pentuer insiste proklamis, kaj Herhor jam antaŭ li diris la samon, ke la fonto de malfeliĉoj de Egipto estis la venkaj militoj.

Do oni ne povas relevi Egipton per nova milito.

«Pentuer estas granda saĝulo kaj Herhor estas granda saĝulo», pensis la princo. «Se ili opinias la militon

malutila, se same opinias la ĉefpastro Mefres kaj aliaj pastroj, eble la milito vere estas danĝera afero?

Kaj ĝi devas esti tia, se tion diras tiom da saĝaj kaj sanktaj homoj.

Kaj se Pentuer mensogis? Kial li farus tion? Kompreneble instigita de Herhor, Mefres kaj de la tuta pastraro. Sed kial la pastroj ne volis militon? Kiaj estis iliaj motivoj? Ĉiu milito ja alportis plej grandajn profitojn al ili kaj al la faraono.

Cetere ĉu la pastroj povis trompi lin en tiel grava afero? Estas vere, ke ili faris tion ofte, sed en malgravaj aferoj, sed ne en la aferoj pri la estonteco kaj sorto de l' ŝtato. Oni ne povas ankaŭ diri, ke ili ĉiam trompis. Ili ja estas la servistoj de l' dioj kaj la gardistoj de la grandaj misteroj. En iliaj temploj loĝas spiritoj, Ramzes mem konvinkiĝis pri tio en la unua nokto de sia loĝado ĉe la templo.


Kaj se la dioj ne permesas a la profanoj proksimiĝi al siaj altaroj, se ili tiel vikle

gardas la templojn, kial ili ne gardus Egipton, kiu estas ilia plej granda templo?

Kiam post kelke da tagoj, post solena diservo, benata de l' pastroj, Ramzes forlasis la templon de Hator, du demandoj okupis liajn pensojn:

Ĉu milito kontraŭ Azio povus malutili Egipton?

Ĉu la pastroj povus en ĉi tiu demando trompi lin, la kronprincon?





Kajeroj el la Sudo

*Bulteno de Hispana
Asocio de Laboristoj
Esperantistaj*



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels82.pdf>

Enhavo

Redaktore.....	2
Parolas la Prezidanto....	3
Tial oni ne aĉetu loĝadon en Hispanio.....	4
UK en Havano.....	6
Kial progresemuloj malutilas al tiuj, kiujn ili deziras helpi.....	10
Mesaĝo pri IVT 2011....	11
Elektronika libro.....	12
La kazo pri Kajeroj....	16
La faraono, 28^a ĉ.....	18

Kovrilo: Loko popola por
renkontiĝo kaj festumado, fama en
la mondo, estas la seskilometra
Malekon' (altpromenejo) de Havano.

ISSN 1886-1997 aŭ
1886-1938 (se printite)
Depósito legal: Z-2398-88

Prezidas: Johano A. Cabezos.
Redaktas: Jesuo de las Heras.
Korektas: Jozefo Pina.
Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon,
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj
respondekas la aŭtoro, ne la
redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon kies
enhavo estas interesa kaj ne
mistraktu personon.

**Tute verkita kaj kompilita per
senpagaj linuxaj rimedoj:
Ubuntu, LibreOffice, Gimp,
Scribus kaj gFtp.**